

Popola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI  HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA VALENCIA (Hispanio)
 REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25

NI FLEGU LA LINGVON!

En internaj pagoj de ĉi tiu numero, ni represas plenkonsente interesan cirkuleron de modela Federacio de Laboristaj Esperantistoj, kiu per severa tono admonas la fuŝantojn de nia lingvo k sugestas planon por eviti aŭ redukti la damaĝojn, kiujn faras kelke da senpripenasaj esperantistoj, tute fremdaj en la literatura vervo k en la gramatikaj labirintoj. Esperanto, en sia movado, estas idealo k instrumento, celo k rimedo, sed, en ambaŭ difinoj, la Fundamento estas k restas ĉiam kiel unika akso.

Komercaj interesoj, privataj simpatioj k eĉ politikaj konsideroj, en multaj recenzoj, pligrandigas la truojn de la kritika kribrilo, tra kiu enŝteligas, kun aproba stampo aŭ diskreta silento, presajoj absolute rifuzindaj laŭ lingva vidpunkto. Estas tre karakteriza detalo, ke ĝuste laborista organizo ĵetas la alarman ŝtonon sur la lagon de la esperantismo. Ĝis nun, por multaj, tiel nomataj, neŭtraluloj, la laboristoj samlingvanoj estis kvazaŭ kriegantaj revolucianoj, por kiuj stilo, formo, beleco k estetiko de la lingvo tute ne validas. Tiu opinio—krom iomete malica—estas erara; tamen oni pruvi ties maljustecon per ĉiutaga superado de sia lingvoscio ĉar, kvankam por larĝaj sektoroj de la proleta esperantismo, Esperanto estas nur rimedo k ne celo, tio neniel signifas, ke la instrumento devas esti nepre fuŝa k malpura. En nia tempo, plej konscia, plej revolucia, laboristo, ne estas tiu, kiu mal-diligente laboras aŭ triviale zorgas pri la maŝinaro, sed tiu, kiu, pro intima konvinko, deziras la transformigon de la sociaj metodoj k, ĉiel penante por tion atingi, samtempe ŝatas la laboron, fleras pri sia profesio k flegas la helpajn ilojn, kiuj obligas al li fari ion utilan por la socio.

Idealto aŭ instrumento, Esperanto ĉiam estas digna k respektinda afero; se por la unua valoro ĝi bezonas sentemajn korojn, por la dua kvalito ĝi postulas spertajn manojn.

Neniel ni estas adeptoj de tiu triviala demagogio, pri tipa profeta senzorgeco, tiom facile ŝatata de tiuj, kiuj vualas sian mankon de kapablo, aŭ konfesas sian naŭzon al studo, per jena flatema deklaro: —Ho, ni ja estas nur simplaj manlaboristoj...

Kvazaŭ la aria kompostado de paĝoj aŭ la korekta konstruado de frazoj estus burĝa dilatanismo!

Ĉiu laboristo, nun pli ol iam, devas fariĝi kvalifikita fakulo en sia metio k en siaj politikaj aŭ kulturaj idealoj. Tio signifas, ke esperantista itamisto, ekzemple, lernu diligente gvidi, ĉiam pli glate, la kondukilon de sia tramo k uzi plej trafe—laŭcele plej majstre!—la sintakson, la akuzativon k eĉ la modestajn komojn de nia bela parolilo!

Ni flegu la lingvon!... Jes; ni ellernu ĝin, kiel simplaj manlaboristoj, tio estas, kiel kvalifikitaj proletoj, kiuj samtempe ankaŭ estas kvalifikitaj esperantistoj!

Per la Frukto oni konas la Arbon

Kiam la brigadoj de la Popola Armeo triumfe alpaŝis en la unuajn stratojn de Teruel, ĉiuj faŝistaj gvidantoj, k parto de la ribela garnizono, kun deviga akompano de granda nombro da civilaj personoj—inter ili virinoj k infanoj—rifugiĝis malantaŭ la muregojn de plej fortikaj domoj, kun la intenco rezisti ĝis la eventuala veno de la faŝistaj divizioj, kiujn Franko urĝe liveris por rekonkeri la urbon, kies perdon ankoraŭ li ne kuraĝis-konfesi. La stranga konglomerato, el maŭroj, italoj k germanoj, tuj spertis rigore diferencojn inter la fronto de Teruel k la frontoj de Bilbao k Santander. Plej imponaj atakoj, plej furiozaj puŝoj, dum neĝa tempestego, en apoteoza batalego daŭranta ses tagojn, neniel sukcesis starigi kontakton kun la sieĝataj korpusoj kiuj, pro timo al meritita puno, plilongigis la reziston pli ol du semajnojn.

Kiam la espero pri helpo vaporigis, kiam la malsanuloj k vunditoj superis la kvanton el taŭgaj soldatoj, kiam tiuj lastaj ne plu jam volis rezisti, la ĉefa ribela kolonelo rezignis je la gloro k atentis la inviton al kapitulacio. La interkonsento estis rapida; la dignaj k humanaj kondiĉoj de la Registaro estis akceptataj. Miloj da volontaj k devigaj rezistantoj forlasis la redutojn en patosa karavano. La promeso, pri respekto al ĉies vivo, fidele plenumiĝis. Niaj soldatoj, post sia triumfo, volis—avidis!—montri kontraston de faŝista k popola kondutoj. Oni forgesis la doloron, de moralaj k fizikaj vundoj, per kora sinteno de heroaj venkantoj antaŭ humilaj venkitoj. Tra la riĉa kolekto de grandiozaj epizodoj, aperas gigante la figuro de iu simpla soldato, kiu rekoninte kaptiton, kiel murdinton de lia patro, sufokis stoike la impulsojn de venĝemo kondukinte lin garde ĝis la provizora karcero...

Ne estu ni kiel ilil Jene sonoras la fiera devizo de nia Popola Armeo ankaŭ en Teruel, kvankam la tieaj faŝistaj kapitulaciintoj ne estas normalaj militkaptitoj. Ili estas ribelintaj militistoj, perfiduloj al Hispanio, rompintoj de juroj k promesoj, rezistantoj al la legitima leĝo, ĝis plej ekstrema horo, malantaŭ la abomeninda ŝirmo de virinaj k infanaj korpoj...

Sur la kapon de tiaj kulpuloj povas fulme fali la drastaj punoj de la milita kodo k neniu rajtus senti skrupulojn pri jura aŭ morala karaktero. Tamen, kune kun la Respubliko, eniris en Teruel la komitato k la humaneco. Oni mangiĝis malsatantojn, oni trinkigis soifantojn, al kies korpoj oni ŝanĝis ĉifonojn per puraj k varmigaj vestoj. Kuracistoj k flegistinoj zorgis pri vundoj k malsanoj. Se per la frukto oni konas la arbon, laŭ biblia sentenco, la deklaro de la Teruela episkopo, pri nia ĝentila traktado, utilas al la publika opinio por kompari niajn procedojn kun la krimoj de faŝistoj, post iliaj venkoj en la sudo k en la nordo, kie, post sep monatoj, ankoraŭ rampas la funebra ombro de eŝafadoj k ankoraŭ intermite krakas la pafoj de ekzekutantaj pikedoj. En la sama persekuto ĉiuj falas: baska katoliko, modera respublikano, socialisto, komunisto k anarkisto ĉar, por la monstroj, ĉiu idealista persono estas ja danĝera ruĝulo...

Ni ne estu kiel ilil Ho ne, tute ne! Ni batalas devige k ni mortas ofere. Ni bedaŭras, ke dum batalo pereas veraj kanajloj apud bonanimaj homoj. Sed, por eviti definitive la fajron de milito k la ekziston de fripono, ne kongruas la kvieteco de pacifisto, kiam la bandito atakas. Ili estas la regreso k ni estas la progreso. Ili estas la teroro k ni estas la justeco. Tial, la Respubliko mem protektas la korpojn de tiuj, kiujn nur la magistratoj serene juĝos.

Ilia ĝojo, en venkitaj regionoj, estis sovaĝa, kun varmaodoro de sango. Nia emocio, en liberigitaj urboj, estas infana k romantika, kun aspektoj tiom naivaj k sentimentalaj, ke la sola riproĉo, kiu svarmas tra nia konscienco; tra la histoj de nia koro, estas iu admonanta dubo ĉu ni agis dece traktante, malkruele tiujn, kiuj nur kruele scias nin trakti...

Popolo, kiu scias morti, estos neniam sklavo!

LA U. G. T. TROVIS SOLVON POR SIA INTERNA PROBLEMO

Dum kelkaj monatoj, daŭris en la interno de la U. G. T. (Generala Unio de Laboristoj)—Sindikataro sub marksisma influo—diverĝoj, kiuj akriĝis k estis danĝeraj por la unueca agado de la hispanaj laboristoj. Intence ni prisilentis la aferon, ĉar ni ne volis aspekti partianoj de tiu aŭ alia el la tendencoj sin kontraŭstarantaj. Ni, kiel la tuta laboristaro, bedaŭris la situacion, k deziregis, ke, same kiel en la frontoj la soldatoj formas unuecan blokon sen diskutoj, ĉesu ankaŭ la disputoj—sengravaj esence, kvankam gravaj fakte—kiuj dividis la potencon organizon. Feliĉe, ni povas hodiaŭ sciigi kun ĝojo al nia legantaro, ke la afero solviĝis kontentige post kunsido, kiun prezidis franca k-do Jouhaux, Delegito de la F. S. I. (Internacia Sindikataro Federacio). La du samcelaj branĉoj de la U. G. T. jam kuniĝis k post tio oni eldonis manifeston al la proletaro, el kiu ni represas parton:

«Ĝis antaŭ nelonge, la lojala Hispanio elportis gravan malfacilaĵon: La unueco de nia Sindikataro, nepre subtenilo por la defendo de la konkeroj de la laboristoj k por la finvenko de la Respubliko kontraŭ la Faŝismo, estis rompita. Dividite je du tendencoj, Federacioj situis kontraŭ Federacioj, Sindikatoj kontraŭ Sindikatoj, proletoj kontraŭ proletoj. Tiu pasia polemiko reĉhis eksterlande k domaĝis nian komunan batalon. La Internacia Sindikataro Federacio sendis respon-



decan kamaradon, kun la celo repacigi la diversopiniantojn. Post kelkaj preparaj kunsidoj, finfine okazis speciala kunveno, kiun partoprenis la Nacia Komitato k aliaj reprezentantoj. Konklude oni aprobis rezolucion, kiu decidas: stari apud la Registaro por hejpi ĝin, defendi la liberecon k la sendependecon de la Respubliko; klopodi por interakordiĝo kun C. N. T. (Nacia Konfederacio de Laboro) pri komuna programo de konkretaj realigoj, implicantaj ankaŭ plifortigon al la Registaro k fortikigi k pliiĝi la konkerojn jam atingitajn de la hispana laboristaro. La harmonio do, restariĝis interne de la U. G. T. k samtempe la normala funkciado de ĉiuj ties organoj, kun siaj tradiciaj rilatoj kun la Socialista Partio k siaj elkoraj sentoj al la Komunista Partio. Ni prezentas ĉion ĉi, kiel omaĝon al la kamaradoj batalantaj en la frontoj, imite al ilia ekzemplo de unueco en la tranĉeo. La kamaradoj laborantaj en la ariergardo streĉu sian forton, laŭ la postuloj de la milito! Ĉiuj akcelu la laborplanon, senatente al la malnovaj kvereloj».

La manifestado finiĝas per vortoj dediĉitaj al la volo pri venko kontraŭ la Faŝismo, por masoni, sur la venkon, novan landon de liberaj laboremaj laboristoj.

Prezidas la rekuniĝintan U. G. T., Ramon Gonzalez Peña, inteligenta k senlaca pioniro, kiu estas ankaŭ la prezidanto de la Hispana Laborista Socialista Partio.

La Informa Bulteno de la Centra Stabo de la Respubliko diras en unu el siaj lastdataj resumoj:

«Ni estas ĵus konkerintaj la naturan pordon (Teruel) de la orienta landparto. Tiu pordo estis okupata de la ribeluloj. Ili povis malŝlosi ĝin k forĵeti siajn invadajn trupojn al Sagunto k Valencio. Sed hodiaŭ, tiu pordo jam estas nia. Ni mem estas kiuj povas malfermi ĝin, sed en la kontraŭa direkto. La riĉa marborda mezorienta teritorio ne plu estas en danĝero, kiam nia Armeo minacas la centrajn regionojn de la malamiko. Se la faŝistoj preparis fortan atakon kontraŭ Madrido, la perdo de Teruel profunde meditado ilin pri la malfacilaĵoj, kiujn ili renkontus se ili entreprenus similan aventuron, ĉar ili havus sur siajn flankojn, k preskaŭ sur sian ariergardon, la respublikanajn trupojn.» La ŝtala pugno de la popolo komencas doni decidajn batojn!



▲ La oficiala germana presagentejo D. N. B. sciigas, ke «ĉiuj kalumnioj de la Papo kontraŭ Germanio, en lia Encikliko de la 31. Decembro, havis nenian efikon ĉar la germanoj estas tre okupataj por sia interna paco».

Jen modela respektopravo al la Sankta Patro. Tre karakteriza eco de la aliancanoj de Franko, tiu pia katolikado, kiu genufleksiĝas antaŭ la pastroj... se tiuj interkonsentas kun li. Sed se la pastroj ne submetiĝas al lia despotismo, li mortigas ilin per mitralo, kiel en Bilbao, kiel en Gernika...

▲ En solenaĵo klerikala k faŝista, okazinta en Pamplono laŭ la gazeto *Heraldo de Aragon*, el Zaragozo:

«Oni celebris la 24. Decembro, je la sesa k duono matene, la kvaran procesion, organizita de la Episkopo, por preĝi pri la Paco».

Ja, burĝonas simptomoj! Ili ekkomencas babili pri paco. Ĝis nun, eĉ

Grainetoj

la diocezaĵoj moŝtoj mem, nur parolis pri venko k ekstermo al la «ruĝuloj». Sed la popolo ne vane lernis batali!

▲ La Episkopo de Teruel, kaptita en la lasta reduto de la urbo, memvole liveris al la respublikana komandestro skribaĵon, kies tekston ni kopias:

«Tre plezure mi atestas, ke depost mia evakuigo el la Seminario de Teruel, ĝis mia alveno en la fervojan stacidomon de Rubielos de Mora, mi estis traktata kun ĉiuspeca respekto, kiun mi tute dankas. Subskribite: Anselmo Polanco Fonseca. -8. Januaro 1938».

Ĉi-okaze ni bone memorigas pri alia episkopo, eksa kaptito de la Respubliko. Temas pri s-ro. Amundarain, kiu nun okupas la diocezon de Valladolid, en la faŝista zono. Oni proklamis, ke ni estis dispecigintaj lin, sed li

Ayuntamiento de Madrid

restis sana k senvunda. Kaj ankaŭ dankal! La faŝistoj ne pardonis lin pro tio k nomas lin ankoraŭ la «ruĝan episkopon», ĉar li rakontis la veron pri la tempo, dum kiu li vivis sub la turmenta jugo de la... aziaj hordoj, kiel nomas nin la nacieca konglomerato.

▲ Inter la interesa dokumentaro kaptita de nia Armeo en Teruel, ĉe la okupo de tiu urbo, estas iu komuniko el Salamanko ordonante la disigon de la Fervojista Sindikato de «Hispana Falango» (faŝistoj) «okaze de bedaŭrindaj oftaj sabotadoj en la fervojoj, okazigitaj de la marksistaj elementoj, eniĝintaj en la vicojn de la organizo, kaŝante sian ruĝecon».

Vana pretendo estas ja konsistigi sindikatojn per faŝistaj laboristoj, ĉar efektive la faktoj pruvas, ke la proletaro estas absolute antifaŝista. La frankistoj jam plene spertis, spertas k spertos tiun ĉi simplan veron.

PLANOJ RENVERSITAJ

Kvankam ĉi tiu artikolo de Yves-Marie Goelo jam aperis en kelkaj ĵurnaloj internaciaj, ni represas ĝin kiel interesan dokumenton pri la celoj k planoj de la faŝistoj, tiom profunde konsternitaj nun pro la perdo de Teruel.

La granda ofensivo de Franko estas ĵus disartikigita, pro la impona puŝo de la respublikanoj, en la fronto de Teruel.

Tro bombastaj anoncoj, pri decidaj atakoj, de la ribela Stabo, permesis al la Supera Komando de la Respubliko malligi la fadenojn de la batala koalizio, kiu, laŭ supozo de Salamanko, estus la lasta k decida.

Franko, kun sia Stabo, ne povis ĝustatempe elekti unu el la tri jenaj solvoj, kiuj sufiĉe loge tentis:

UNUE.—Atako en la suda fronto, en direkto al Almerio k poste al Kartageno, kies grava haveno, ĉe la Mediteraneo, estus la ĉefa celitaĵo.

DUE.—Atako kontraŭ Gvadalaĵaro k Madrido.

TRIE.—Atako, tra la frontoj de Aragono, celante trafi la bordojn de la Mediteraneo.

Ĉiu atako tiel prezentas malsamajn aspektojn: Atako en la suda fronto, en direkto al Almerio k al Kartageno, povus oferti la ŝancon redukti la amplekson de la blokendaj marbordoj. La ribela eskadro, efektive, disponas nur je malgranda nombro da ŝipoj por asekiuri nun taŭgan blokadon, kiu, pro zono tro longa, estus certe senefika. Por atingi tiun kvaliton minimume, estus necese unue malgrandigi la longon de la registara marbordo. Plie, oni povus aspiri duonigi, je du partoj, tiun saman fronton per konkero de Kartageno, grava ŝipa baseno por la Respubliko. Tiu operacio prezentis tiel du avantaĝojn por la ribeluloj: Bona sukceso aperis kun relativa facileco k la entrepreno ŝajnis kosti malmultajn perdojn pri homoj k materialo.

La faŝistoj estus atakante plej forte, pro la ebeneco de la tereno, aktive utiligante siajn motorigitajn elementojn kun la moderna artilerio, kies stokoj ili treege pligrandigis. La klimato, sufiĉe milda, estus favora por daŭra utiligado de la aviadiloj, kiujn tre abunde posedas la trupoj de Franko. Sed, tiu ĉi operacio, eĉ kun plena sukceso, ne estus ankoraŭ decida. Ĝi permesus nur blokadi kun ioma efiko. Nenio pli! Sen forgeso pri la registaraj rimedoj. Nenia subita solvo do povus salti de ĉi tiu aventuro. Tamen, urĝe tion postulas ĉiuj helpantoj, plej obstinaj k fanatikaj, kiuj dancas ĉirkaŭ Franko; precipe estas senpaciencaj la italoj, kiuj grumbas pro la senfineco de la milito, kiun ili certe ne fidus rezisti finance multan tempon. Antaŭ la rapidemo

de la italoj, fajfis alia solvo: Fortega atako al Madrido!

Al tiu operacio puŝis du motivoj:

a) Havigi, al la italaj kunlaborantoj, okazon ĝui revenĝon pro la malvenko en Gvadalaĵaro, sur la sama loko k preskaŭ dum la sama momento de ĝia unua datreveno. Tiamaniere, la celo estis multe pli politika ol taktika...

b) Psikologia faktoro:

Humiligi Madridon k per tio vundi la fervoron de la respublikana ariergardo, impresante samtempe la mondon, precipe Anglion.

En ambaŭ kazoj, ofensivo destinita al la «propagando» nur rajtas revii pri tio, sed neniel pri nepra finvenka rezultato. Restis la tria solvo: Atako tra la fronto de Aragono.

Tiu ĉi atako devus esti fortega. Ĝi havus la celon likvidi, per unu sola bato, la Respublikon duonigante ĝin. Se tio efektiviĝus, la minaco por Madrido estis nepra, same kiel la danĝero por Katalunio. Tamen, la atako tra Aragono entenis gravan riskon: Se unu venko povus decidigi la sorton de la milito, ankaŭ unu fiasko povus alporti veran katastrofon.

Ĉiuokaze, tiu marŝo kostus grandajn damaĝojn al la armeo de Franko ĉar la respublikanoj jam ŝirmis sin per tre masivaj fortikaĵoj, post multaj monatoj sur tre solidaj k bone aranĝitaj pozicioj. Ilia materialo estas preskaŭ unuaklasa, k eĉ la tereno, kiun ili okupas, taŭgas perfekte por ĉiu ajna defensivo: La brigadoj deĵorantaj ĉe la diversaj sektoroj estas zorge elektitaj.

Dum longa tempo, la ribela Stabo dubis inter la tri projektoj. La lasta estis la plej ŝatata; ĝi donis pretekston por liveri, en unuan vicon, ĉiujn restintajn maŝinojn k italojn, kiuj multe klopodus por alproksimigi la triumfon. Tiu ĉi taktiko petolis vigle per duobla avantaĝo:

a) Gajni la militon dank' al impone apoteoza batalo.

b) Ofere likvidi la maŝinojn k italajn kontingentojn k elimini per tio la kaŭzojn de la plej tikla konflikto en la faŝista Hispanio. Franko devis elekti, tra la fluo de la influo de siaj multenombraj konsilantoj, flankon inter la gloro de generalo k la respondecado de ribelestro.

Ĉiuj, tiuj duboj, konsultoj k hezitoj, donacis tempon al la Centra Stabo de la Respubliko, rigore organizita intertempe, por studi la bruan frapon, kiu renversis ĉiujn planojn de la malamiko ĉe la fino de la jaro.



La apogo de la internacia Demokratio

EN ASTURIO ANKORAŬ RESTAS HEROOJ

Iu kamarado el Asturio, ĵus veninta al niaj vicoj, tra la fronto de Teruel, konfirmas la onidirojn, kiuj cirkulas pri la epopea rezisto de niaj soldatoj en la Nordo:

Ankoraŭ restas en Asturio, tra la montoj nomataj «Pintoj de Eŭropo», batalionoj, kiuj bataladas kontraŭ la okupantoj de la regiono. Ili sin defendas k eĉ kelkfoje atakas la malamikajn taĉmentojn k dekumas ties rotojn. Tiuj heroeĝaj kamaradoj sentas viglan malamon al la Faŝismo, malamo kiu grandigas ĉiufoje, kiam ili sciigas pri la abomenaj krimoj de la faŝistoj, murdantaj la socialistojn de Sama k la anarkistojn de Felguera.

Kun tiaj soldatoj, estus neeble al la invadistoj konkeri la Nordon se la Ne-Interveno ne enkatenigus la manojn de nia Respubliko.

Plurfoje estas dirite, ke nur kun helpo de niaj ĉas-aviadiloj, al kiuj estis malpermesate traflugi la sudon de Francio; ankoraŭ nun flirtus la trikolora flago de Hispanio en Bilbao.

Antaŭ tiuj abruptaj montaroj, okupataj de soldatoj kies brustoj estas ankaŭ montoj, la trupoj de la perfida dego fiaskus seninterrompe, malgraŭ la persista k grandkvanta subteno de «naciaj» italoj k germanoj.

La nordo de Hispanio povus esti tiam la truo, tra kiu estus forfluita la vivo de la Faŝismo. Ne estis tiel pri tio kulpas la Ne-Interveno. Jek estas, kiel escepta pruvo pri nia aserto, la nekredbla rezisto de tiuj herooj, ankoraŭ nun kontraŭstarantaj la invadistojn en la fieraj suproj de la heroeca Asturio, kies martireco donis tempon, por reorganizigi, al la veteranaj brigadoj el kiuj ampleks konsistas la Popola Armeo.

DICNA KAJ OPORTUNA RESPONDO

La Ministro pri Internaj Aferoj, k-do Zugazagoitia, socialisto, akceptis viziton de redaktoro de la angla gazeto *Manchester Guardian*, kiu faris al li demandojn. Ĉi-sube, ni ekstraktas la trefon respondon:

«Dumaniere montriĝas la eksterlanda oficiala opinio pri nia milito: Ambicia sciivolemo k stulta sciivolemo! Estas ambicia, la sciivolemo de tiuj, kiuj deziras koni la signifon de nia milito, kiu dekomence ŝajnis ribelo de militistoj k tuj transformiĝis je invada milito. Tiun klaran proceson ankoraŭ ignoras multaj personoj, precipe ĉar la internacia politiko de la kancelarioj damaĝis la Respublikon. Oni rifuzis al registaro de lando, kiu estis en amikecaj rilatoj kun ĉiuj, la rimedojn, kiujn ĝi bezonegis por alfronti la internan ribelon k restarigi la ordon. Tiuj militrimedoj, bezonataj de la registaro—legitima registaro—estis ofertitaj k aĉetitaj pere de klaŭzoj en komercaj traktatoj. Ni rajtis ricevi tiun materialon k oni rifuzis ĝin al ni, ĝuste kiam ĝi estis al ni plej necesa. Ĉu oni pensis, ke Hispanio kontraktis liveradon de armiloj por konstrui lernejojn k universitatojn?

Estas jam tre malfrue, por ke ni ankoraŭ proklamu la konatan veron, ke Italio k Germanio eksperimentadas sur nia dolorigita hejmlando—sen doloro siaflanke—la batalilojn, kiujn ili produktas por tute nemisteraj celoj, kiuj ne limiĝas al Hispanio. Meditu pri tio angla k franca popoloj!

Neniam tiel skandale, fremdaj potencoj pretendis tordi perforte la volojn k dezirojn de libera popolo, antaŭ la indiferentaj nazoj de respondecaj nacioj, kiuj emfaze parolas pri la Juro internacia.

Jen estas la hispana problemoj k estas tute senutilaj la sentimentaj reagoj, kiujn kelkaj landoj tre ŝatas. La milito estas tre serioza fenomeno k Hispanio rajtas ricevi helpon por malhelpi la disvastigon de tiu malbonaĵo. Oni ne plenumis la neprajn deojn, al ni ŝulditaj. Krome, oni superŝutas nin per ĉiuspekaj malsatindaj sciivolemoj. —Kion vi faris pri viaj artaj trezoroj? Kion pri la bibliotekoj? Kion pri viaj oraj rezervoj? Kio okazis al iu sinjoro blonda, kies patro posedis bastonon? Kaj la Respubliko estas devigata foje, refoje k ankoraŭfoje pruvi, ke ĝi zorgas tiel bone kiel povus k farus Francio aŭ Britio, pri ĉiuj siaj materialaj k moralaj valoroj. Tra la mondo iras atestoj senpartiaj, el bonfamaj personoj en la intelektaj sferoj, pri la fervoro per kiu la Respubliko zorgis k zorgas pri siaj muzeoj k bibliotekoj, ĉar la Respubliko estas Hispanio. Sed tiu vero ne aperas sufiĉe klara al tiuj, kiuj obstine en sia stulta sciivolemo, forgesas la fakton, ke ni faras kruelegan militon devigate, k venas por demandi al ni pri iu blonda aŭ bruna homo, kies patro havis bastonon. Kio okazis al li? Okazis same kiel al tiom da miloj k miloj da hispanoj. Ke li mortis sen lasi postsignojn. Kiel oni mortas en batalo. Kiel ĉiutage riskas sian vivon, ĉiuj, kiuj fordonas al la Respubliko siajn streĉajn klopodojn. Preteksti tiun veron por fari sekteman politikon, estas fia konduto, kiun oni tre malfacile povas kontraŭstari.

Hispanio, la hispana popolo, havas siajn fervorojn k estas memkompreneble, ke ĝi ofendiĝas kiam oni tuŝas ilin. Sen ili, kio postrestus en ĉi tiu horo el nia sendependeco? Germanoj k italioj trudus, per siaj brutecaj legkodoj, la kondiĉojn de nia kolonia servuteco. Vi, prokuroroj demandemaj, kion vi faris por helpi nin?

Ĝis nun, vi nur faris jenon: ofendi nin!

KRONIKO DE TERUEL

La Patro de la Nepo de la Avo

Sepdekjaraĝa geedza paro, kiu loĝas apud ŝoseo, akceptis kun granda entuziasmo la venon de la Popola Armeo. La modesta hejmo transformiĝis je provizora kazino por roto de mitralistoj.

La soldatoj, la muloj k eĉ la materialo ĝuas la fervoran zorgojn de tiu paro da simpatiaj gemaljunuloj. La edzo estas tiel kontenta, ke li devigas ĉiun soldaton ŝidi apud la forno k trinki glason da nigra vino. Sata de ĝojo pro nia venko, li ne ĉesas paroli al ĉiuj pri sia filo, kvazaŭ kun neforigebla obsedo.

—Ĉu vi ne konas mian knabon? Ho, li batalas en la armeo de la Respubliko, ekde la unuaj tagoj de la ribelo. Kiam la kanajloj leviĝis kontraŭ la popolo, mia filo estis en najbara vilaĝeto, laborante kiel plugisto. Venis la civilgardistoj k tuj komencis la tumultoj por la maldekstruloj. Mia knabo povis forkuri k aliĝis en bataliono da milicianoj. Estis agrable scii, ke li restis en la proksimaj sektoroj. Ĉiufoje, kiam mi aŭdis pafojn el tiuj montoj, ĉiam mi diris, por mi mem, tre plaĉe: «Ekstermu ĉiujn faŝistojn, fileto, ĉar ĉi estas malamiko de la malriĉuloj. Ho, fulmotondrolse mi estus juna.

Kvankam la faŝistoj sciis, ke mi estas respublikano ekde la infana aĝo, ili ne mortigis min ĉar mi ŝajnas nun tro kaduka. Sed, malgraŭ tio, oni devigis min plenumi la pezan taskon porti akvon ĉiutage, per kruĉo, al la parapetoj de la «Dento» (*).

Iun vesperon, revene de tiu laborego, el arbustoj saltis korpo, kiu ĉarkaŭprenis min tre forte. Mi ekpensis, ke oni volis murti min.

—Ne timu, patro, ĉar estas mil—flustris, ĉe mia orelo, amata familia voĉo, kiel eĉo de pasinta feliĉo.

Efektive, estis mia filo, kiu transpasis la malamikajn tranĉeojn preter la fluo de la rivero. Post tiu vespero, li vizitis min multajn fojojn, malgraŭ la faŝistaj gardistoj. Vi ja povas kompreni la ĝojon, kiu ŝprucis el mia koro, kiam la knabo rakontis pri la agrabla vivo sub la standardo de la Respubliko. Dikaj larmoj fluadis el miaj okuloj, ekaŭdinte ke, trans la parapetoj, la fekundaj valoj ĉe la bordo de la rivero, ĝis Valencio, estis ĉiuj plene prisemitaj k kolektive prilaboritaj de humilaj kamparanoj, al kiuj la Registaro mem aĉetas la rikolton de pomoj—pagante tiajn fruktojn laŭ tre bona prezo. Dum la banditoj de Teruel—sciantaj nur persekuti

(*) La «Dento de Teruel» estas abrupta rokego en la ĉirkaŭaĵoj de la urbo.

En nia speciala milito, la tranĉeo ankaŭ estas lernejo. Tie, la analfabeta soldato lernas legi k skribi. Ĉiu malklera brigadano akiras elementajn sciojn pri ekonomio k politiko, pri la motivoj k celoj devigantaj lin forlasi la hejmon, preni armilojn k surporti la pezan vivon de aktiva batalanto. Komisararoj k oficiroj, krom socialaj aŭ teknikaj gvidantoj, estas egale afablaj kamaradoj k fervoraj instruistoj, kiuj modlas tre pacience la virgajn spiritojn de miloj k miloj da uniformitaj junuloj aŭde rigardantaj, unuan fojon sen vido de malklereco, mirindajn horizontojn ĉiam pli k pli vastiĝantaj, sen ia fatamorgano, laŭ ritmo de ties kreskanta intelekta kapablo.

Esperanto, nia lingvo internacia, kiel forlika branĉo de popola kulturo, ludas reliefe sian rolon en tiu nobla k eduka tasko. Niaj esperantistaj amikoj, multaj el ili kun altaj komandaj rangoj, disigitaj tra ĉiuj frontoj, profitas la tempon, dum momentoj de ripozo k enuo, por transformiĝi tre

EĈ TIE PROGRESAS ESPERANTO...

plaĉe je pacaj batalantoj klarigante al la armeanoj la malnovajn problemojn pri unu lingvo, komuna al ĉiuj homoj de la mondo, kies racia solvo jam ekzistas, jam funkcias, jam utilas...

La teorio cedas lokon al la praktiko; la propagandisto fariĝas profesoro en tiu paradoksa liceo, kia estas la tranĉeo. Vigle ekfloras kursoj sur la batalkampoj, kie la disĉiploj ne malfruas nek la instruantoj plendas pro manko de fervoro. La provizo de lernolibroj k gramatikoj en la deponejo maldikiĝas! Preskaŭ ĉiutage, ni ekspedas tiasekajn paketojn al la fajrolinio, ĉar Esperanto estas la plej bongusta trinkaĵo por tiu sana soifo de universaleco, kiu vekigis subite ĉe la defendantoj de la Respubliko. Tio estas nur aŭguro por postaj sukcesoj; certe, la grajnoj

torturi la honestajn personojn, aŭ etendi la brakon kvazaŭ por kontroli pluvetadon—malpermesis al ni kulturi la teron k eĉ ankaŭ preskaŭ libere promenadi tra la placo...

Sed... nun venas la bombol Mia filo edziĝis, du monatojn antaŭ ol la milito, kun ĉarma k laborema junulino, kiu melankolie sopiris pro lia tro frua foresto. Kompreneble, mia filo avidis revidi ŝin. Kaj dum pluraj noktoj, li riskis la vivon por karesi k akompani la dormon de sia bela edzino.

La tempo ne estis perdita ĉar, post malmultaj semajnoj, mia bofilino gravediĝis. Fulmotondro, kia skandalo krevis en la kvartalo La fiaj langoj de ĉiuj bigotulinoj, flatemaj antaŭ la lokaj despotoj, komencis ĵeti koton sur la reputacion de mia parencino.

Tre rapide ni devis inventi historieton por kovri la situacion. Mi iris tuj en la Juĝejon k prezentis la denuncon, ke iun nokton alsaltis la hejmon de mia bofilino iu faŝista nekonata kapitano, kiu perforte profanis ŝin. La juĝisto registris proceson k gardis ĝin tuj en arkivo. Li konsilis al mi paciencon k silenton por konservi la kapon. Mi konsentis tre serioze, kun interna ridemo. La «sekreto» disvastiĝis k la klaĉoj subite ĉesis, sen atento al la «makulo» de mia familio. Siatempo naskiĝis mia sana nepo. Tiam, denove mi iris en la Juĝejon k diris aplombe:

—La plej eta favoro, kiun vi povas fari, por lavi la honton de mia bofilino, estas permesi doni al la infano la baptonomon de mia filo Karlo. Memoru pri la ofendo...

La juĝisto klinis la kapon k akceptis konfuzite.

Kiam venis la respublikanaj trupoj, la vera patro de la «nepo de la avo» aperis, saltante pro ĝojo povi jam publike brakumi sian edzinon k ŝmace kisi sian fileton. La avo, ebria pro entuziasmo, freneza pro la emocio de la venka restarigo de la legitima ordo, ekprenis la nepon, inter siaj ostoriĉaj brakoj, k rigardante la forkuron de la lastaj faŝistoj, li kraĉis al ili tutan sian malsaton:

—Stultuloj! Ĉu vi ne observis, ke la infano estas kvazaŭ portreto de sia patro? Ĉe mia filo! Kiu povis supozi, rezignon, ĉe mia fiero, antaŭ abomeno de iu ajn faŝista fripono? Fulmotondro! Tiukaze tuj mi estus lin punanta, ĉar por kio mi bezonis la vivon en la mezo de tia via infero?...

dissemitaj de niaj bravaj kolegoj, en ĉiuj liberaj universitatoj, sur la fronto de la demokratio, estos siatempo fekunda rikolto de belaj steloj en urboj k vilaĝoj, kie laboros k loĝos, kun gajnitaj paco, ĉiuj civilanoj, kiuj hodiaŭ—pro sankta devo k sama honoro detruis tuj la kanceron de la Faŝismo—kunigas hazarde en tranĉeo akirinta meritojn por supera kategorio de Akademio...

Nur dank' al Esperanto, la varma kareso de la frata eksterlanda solidareco atingas rekte eĉ la plej avangardajn parapetojn. Kovertoj, kun ekzotikaj markoj, alflugas ĝis la manoj de la tranĉeanoj malicete feliĉaj, pro la mirig de ties rigardoj. Tiel, tie, en la batalejo, ĉi popolfrota esperantisto perceptas admiraĵojn anstataŭ moko. Sed oni, komplezeme k gentile, malkovras la sekreton de sia privilegio per plia k plia varbado por dense paraleligi, en Hispanio, la pereon de la tiranio kun pozitiva venko de la verda stelo!

Ludoviko HERNANDEZ

KONSIDEROJ POST UNU JARO

Sed, dum la unua tagiĝo rozkolora de la nova jaro, ni turnas la rigardojn k la pensojn, al la sama dato de la pasinta jaro, certe ne mankas motivoj por alpaŝi plenespere sur la freŝan vojon.

En la komenco de pasintjara januaro, niaj milicianoj haltigis, apud la rivereto Jarama, la faŝistajn regimentojn, kiuj, sub rekta komando de germanaj oficiroj k sub protekto de multaj aviadiloj k tankoj, antaŭenmarŝis en direkto al Madrido. Poste, la ebenaj kampoj de Gvadalarajo atestis pri senorda forkuro de la fanfaronaj italaj divizioj. Preskaŭ samtempe, la kuraĝo de la novaj popolarmeanoj venkobatis, en Andaluzio, la brigadojn, kiuj celi rabi al la Respubliko la valorajn hidrargajn minojn de Almaden.

Nia unua granda ofensivo kontraŭ Brunete, en julio, malkovris al la mondo, por rapideco k disciplino, la efikon de niaj propraj rimedoj. La faŝistoj, post la surprizo, reagis per plej impona kontraŭofensivo, kun helpo de centoj k centoj da plej modernaj aviadiloj. Tamen, la atako haltis ĉe la rando de Brunete mem, pro la taŭga rezistokapablo de niaj soldatoj, en la fortikaĵoj de la konkeritaj pozicioj. En la sudaj sektoroj de Madrido, la vana pretendo kapti la gloran ĉefurbon ricevis adekvatan punon...

La reorganizado de la Armeo, sub unueca komando, la vigla disvolviĝo de la Industrio k la metoda preparo de larĝaj rezervoj, ebligis jam entrepreni vastajn ofensivojn. Laŭ tia signo, niaj soldatoj ekatakis en Aragono sur fronto el cent kilometroj, konkerante ampleksan teritorion kun multenombraj vilaĝoj, inter kiuj elstaras Belchite.

Post tiu epizodo, la iniciatemo pri ritmo de la milito jam apartenas al nia Armeo, en ĉiuj frontoj senescepte, de la Pirineoj ĝis Andaluzio. La brila ofensivo, en la norda Aragono, poluris ankoraŭ pli la mekanismon de ĝia tekniko, la rapidecon de ĝiaj movoj k la efikon de ĉiuj atakoj de la militaparato de la hispana popolo.

Kaj nun, la mirinda realo de Teruel

RADIO-AMATOROJ!

Esperantista Artistaro disaŭdigas teatraĵojn: La 17. Januaro per radiostacio P. T. T. PARIZO je la 22'45 oni ludos «La Paco»; la 24. Januaro, je la 22'45 «La Burĝa Nobelo» de Molière; k la 31. Januaro, samaj loko k tempo, «Sokrato». — Skribu viajn impresojn al:

Esperantaj Disaŭdigoj. 107, rue Grenelle. PARIS 7 (Francio)

MOZAIKO

● La fama ĉeĥoslovaka dancistino Mirza Holdzbajova aranĝis artajn vesperojn, en diversaj urboj de respublika zono k eĉ en la fronto. Ŝi destinis ĉiujn enspezojn por la junularo. Antaŭ ol foriri el nia lando ŝi donacis la sumon da 31.000 pesetojn al koncerna komitato. Jen trafa ekzemplo de solidareco inter artistoj internaciaj k hispana popolo.

● Dum la dua semajno de Decembro, la komitato de filmartistoj en Hollywood cirkuladis specialan poŝtmarkon, kies kromprezo estas destinita al hispanaj infanoj. Sur ruĝa fono speciale estas presitaj literoj, kio plivalorigas la prezon por kolektantoj. Per tiu enspezado oni aĉetos ludilojn k vestaĵojn por malfeliĉaj infanoj. La organizado estas sub protekto de multaj altranguloj, inter kiuj Lloyd George, Dukino de Atholl, Herriot, Cardenas k aliaj eminentuloj.

● Jen tute neatendita aspekto de la faŝista rezistado en Teruel. Ili konstruis parapetojn per sakoj da fritiko, ĉar ili ne havis sablon. Dume, virinoj k infanoj mortis ĉiutage pro malsato.

● Nia milito ne malhelpas la kulturon. La profesoro Duperier, de nia Madrida Universitato, ĵus vizitis en Londono la «Reĝa Societo pri Fiziko», la «Reĝa Societo pri Astronomio» k la «Reĝa Societo pri Meteorologio», kie li paroladis pri nia nuntempa kleriga aktiveco. Post reveno li tuj rekomencis sian taskon en laboratorio.

● En Parizo nia eksministro Alvarez del Vayo deklaris al ĵurnalistoj: «Kio okazis dum lastaj tagoj en la fronto de Teruel, estas sufiĉe grava averto por tiuj, kiuj pensas pri ebla arango inter respublikanoj k faŝistoj. Ĉiuj devas konvinkiĝi pri mia pravo, kiam mi asertis, en Genevo, ke tio estas simpla fantazio. Hispan-

nio ne havas venĝeman senton, sed ĝi firme decidis venki la faŝistojn k forpeli la invadintajn fremdulojn. La milito nur finiĝos per la venko de la Popola Respubliko».

● La 28. Decembro venis en haveno, apud Gibraltaro, faŝista motorigita kolono, kiu konsistas el tri mil solda-



La Paco pretigas sin al defendo!

toj. La kolono daŭrigis la vojaĝon, per veturiloj italaj Fiat k ĝi estas tute komandata per germanaj oficiroj.

● Dum decembra monato estis fusilmortigataj en Bilbao 147 personoj, k kondamnitaj al mortpuno pli ol mil. La karceroj estas plenplenaj. Dum sama monato estis forpelataj pli ol kvardek baskaj pastroj.

● Tra montoj plej abruptaj, batalas ankoraŭ, en Asturio, kelkaj batalionoj da ministoj, kiuj ĝis nun ne kapitulaciis. La provinestro publikigis ordonon pri submetiĝo, sed neniu obeis, ĉar ili spite al ĉiuj malfacilaĵoj sukcesas. La faŝistoj ne ankoraŭ povis venki ilin. Kelkaj batalionoj da faŝistaj

trupoj, senditaj por ilin albatali, revenis jam tute renverse detruitaj.

● La okazaĵoj, en Rumanio k Egiptio plene pravigas nian aserton pri tio ke nia lando nur estas la unua paŝo en la marŝo, kiun elektis la Faŝismo. Poste jam venos aliaj landoj...

● En la poŝta oficejo de Tetuan (Hispana Maroko) oni malkovris kelkajn pakaĵojn, kiuj entenis bombojn k kiuj estis destinataj al faŝistaj aŭtoritatoj. La pakaĵoj devenis el Maroko mem. Tio bone pravas, kia estas la situacio en tiu «faŝista paradizo».

● Ĉiuj italaj gazetoj, fanfaronis pri la itala partopreno en la batalo de Teruel. Ili asertis ke la itala artilerio, la italaj aviadiloj k batalionoj de «Nigraj Sagoj» ĝin partoprenis. Nun, kiam ili jam fiaskis, kies estas la kulpo?

● Franko ne estras nur faŝistojn; li ankaŭ estras la malhonoron k la mensogon. Jen la rezulto de tia konduto: kelkaj eksterlandaj ĵurnalistoj estis invitataj ĉeesti Teruel por konvinkiĝi, ke la «ruĝuloj» ne ĝin konkeris. La ĵurnalistoj fidis liajn vortojn k vojaĝis al Teruel, sed kelkajn kilometrojn antaŭe de la urbo, ili atingis la batalfronton, tion malfeliĉe ke kanonkuglo trafis ilin. Johnson, korespondanto de usona gazeto *Spür*; Richard Sheephanks, korespondanto de agentejo *Reuter*; Neil, korespondanto de *Associated Press*, mortis k Philby, de angla gazeto *Times*, restis grave vundita.

● En Teruel estas kaptitaj: Episkopo, tri koloneloj, 40 oficiroj, la provinestro, du mil soldatoj, mil batalantaj civiluloj k mil kvin cent vunditoj; nur dum la lasta kapitulacio. Ĉiuj kaptitoj k forkurintoj koincidis asertante, ke la oficiroj manĝis k trinkis dum la virinoj mortsoifis k mortmalsatis.

● La 6. Januaro, vespere, komencis ekfunkcii la radiostacio *Radio-Teruel* je la servo de la Respubliko. Tamen la 9. Januaro, Salamanko ankoraŭ anoncis, ke la urbo ne estas konkerita de la respublikanoj. Ni havis tiam

jam ĉe ni la tutan urbon, la civilajn, militajn k ekleziajn aŭtoritatojn, k la ĉirkaŭaĵojn.

● La franca konsulo en Irun k liaj tri kelpantoj, estas arestitaj de Franko. La franca registaro energie protestis, sed ili ankoraŭ dormas en malliberejo. Eble ili meditas pri la «patriotoj», kiuj libere konspiras en Francio mem...

JUNA LEGANTO!

Ĉu vi scias, ke aperas speciale—nur por vi—ire ŝatinda gazeto?

LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ LA KOMENCANTOJ

Redakcio-Administracio
WEST-GRAFTDIJK
(N. H. Nederlando)

JARABONO:
Nederlando: 0'80 guldeno
Aliaj landoj: 11 fr. fr. 0'70 dol.

LA ANTIFAŝISTOJ ANKAŬ DEVAS MAJSTRI LA LINGVON!

Kun peto pri publikigo, ni ricevis de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj por la Nederlandlingva Regiono, jenan cirkuleron pri kies enhavo ni plene konsentas k promesas laŭeble apogon.

OR PURA LINGVA EVOLUO

La Esperanta literaturo progresas. Iujare aperas novaj verkoj, originalaj k tradukitaj. Kaj dume la literatura lingvo evoluas. Talentaj aŭtoroj k tradukantoj klopodas pliriĉigi la lingvon per rimarkindaj formoj, interesaj esprimoj, ĉerpitaj el fontoj aciaj, tipe Esperantaj k trafaj logikaj rimanieroj.

Nia ĝojo pri tio estus tamen pli granda k plena, se en la amason da ekzistantaj Esperantaj libroj ne ensteliĝus de temp' al tempo verkoj, kies lingva kvalito, stile k gramatike, estas nepre kondamninda. Evidente tro laŭdata «facileco» de Esperanto estas kelke da skribemaj k nepre nekompetentaj esperantistoj siamantere plivastigi la literaturon. Sed plivastigo k evoluigo estas faktoj ne ĉiam egalaj. Al la Esperanta afero unu etaŭga libro povas diversmaniere aŭzi pli multe da malbono, ol cento etaŭgaj verkoj kaŭzas da bono. La etaŭga libro miskreditigas Esperanton ĉe la publiko, kondukas ankoraŭ ludantajn esperantistojn sur vojon lingve eraran, k multe malhelpas la veran evoluon de la literatura lingvo.

Precipe en la lastaj jaroj la nombro da fuŝverkoj grandiĝis timige. Ni devas konstati, ke kelkaj aŭtoroj k tradukemuloj en siaj plumproduktoj

tiom malproksimiĝis de la Zamenhofa stilo, ke la legantoj preskaŭ forgesas la fonton de nia literatura lingvo, pro kio reveno al pura Esperanto fariĝis postulo jam urĝa.

Krom tio la recenzoj en la Esperanta gazetaro pri nove aperintaj verkoj montriĝis ne senescepte fidindaj. Unue, plurajn recenzojn redaktas homoj, same nekompetentaj kiel pluraj libroverkintoj; due, komercaj intereso ludas en tio jam tro gravan rolon.

Pro ĉio ĉi fariĝis necese, ke la esperantistoj, dezirantaj bari la vojon al plua fuŝado de la lingvo, mem okupu sin pri tiu ĉi afero. Konscia pri tiu neceso, F. L. E. en sia laste okazinta kongreso decidis fondi komitaton, kies tasko estu pristudi tiun ĉi daŭre kreskantan malbonon k ellabori rimedojn por kontraŭagi ĝin.

Tiu ĉi komitato, konsistanta el k-doj Buis, Degenkamp, Faulhaber k Makkinje, jam komencis funkcii. Ĝi klopodis ellabori programon, laŭ kiu oni povas agi bonefike. Sed ĉi tiu grava laboro estas tasko ne ekskluzive de F. L. E. Por atingi nian celon ni nepre bezonas kunlaboron de organizaĵoj k privataj personoj ekster F. L. E. k precipe internacie. Kvankam do ne havante jam fiksitan laborprogramon, ni jam alvokas ĉiujn organizaĵojn, instituciojn, eldonistojn, redaktorojn, verkistojn k aliajn per-

sonojn, ludantajn en nia movado tian rolon, en kia ili kapablas helpi al realigo de nia celo, ke ili informu nin pri siaj konsento k preteco kunlabori. Ni fidas, ke multaj influaj esperantistoj konsentos pri nia plano, por ke ni komune povu tiom pli radikale ekstermi la malbonon ensteliĝintan en nia literaturo, barante la vojon al plua fuŝado de la lingvo k plene malfermante la vojon al vera, internacia evoluo de Esperanto, sur bazoj logika k Zamenhofa.

Dum la korespondado pri la labormetodoj la komitato ne restos senage atendanta. Ĝi decidis atenti la recenzojn pri nove aperintaj libroj, se eble mem legi tiujn librojn k, en okazo de malprave favora recenzo, publikigi sian opinion pri la verko koncernata k ĝia erariga recenzo, por averti la legemajn esperantistojn kontraŭ tiaj eldonaĵoj.

Ni esperas, ke sekve de tiaj avertoj ne nur la legantoj fariĝos pli elektemaj, sed precipe la eldonistoj fariĝos pli kritikaj k la nekompetentaj tradukemuloj k lingvofuŝantoj ne havos plu tiom vastan eblon «regali» la esperantistaron per legaĵo lingve maltaŭga.

Ĉiu, kiu deziras, ke Esperanto evoluu logike k internacie, konsciu, ke ĉiu fuŝverko estas malhelpo kontraŭ tiu evoluo. Li ne resignaciu en la malbono, minacanta la lingvon, sed streĉu siajn fortojn por ekstermi la malbonon.

LITERATURA KOMITATO

Adreso: G. I. Degenkamp
Rietstraat 40, Utrecht

NOVA HISPANIO

Ne estas dubo. Kiam Hispanio estos eliginta el sia tragika krizo, ĝia romantika karaktero estos malapeninta. La dekoracio restos sama, eĉ tie, kie la militokazis. Sed la akregaj spertoj elportitaj de tiu popolo, estos ĝin skuinta tiome, ke ĝi tute transformiĝos.

La modernaj transformiĝoj estas tiel rapidaj, k la meĥanikaj progresoj kondukas nin tiel fulme, ke ne plu estas loko en la mondo por la malprogresemaj racioj—konsistigantaj ties pitoreskan rezervaĵon—konamnitaj evolui al ŝablona tipo. Du grupoj loĝadis ĉirkaŭene de Eŭropo, zorge gardante sian apartan indiduecon. La eventoj, pli fortaj ol ili, devigas ilin eniri la rondon. Kiu estis Hispanio? Nenio. Kiu okupis sin pri ĝi? Neniu. Kian rolon ĝi plenumis en la eŭropa aktabulo? Nenian. Vojaĝplano por scivolemaj karavanoj, veturcelo por turistoj amantaj la folkloron. Treadoroj, ciganoj, kastanjetoj, mantiloj...

Same kiel ekzistas hodiaŭ unu plia nacio en Oriento,

morgaŭ ekzistos alia en Okcidento. Versajne, unuiginta ŝtato ŝprucos el la nuna milito. Speco de Federacia Respubliko ŝajnas esti la plej taŭga modelo por Hispanio.

Aro da junaj gvidantoj, la plej multo el ili kun socialisma edukiteco, ĉiuj havantaj modernan spiriton, estos la anstataŭantoj de la antaŭaj ĉarlatanoj. La malkapabla armeo, kun siaj ses cent generaloj por cent mil soldatoj, estos anstataŭata per potenca Popola Armeo, forĝita en bataloj, instruita k armita. Estos necese kalkuli pri Hispanio, same kiel oni nun kalkulas pri Sovetio.

Tiu, kiu ne vidas tiun realon estas blindal Malsaga estas tiu, kiu aljuĝas pli da valoro ol simplan epizodon, al la fanfaronado de Franko, rifuzita de ok dekonoj el la lando! La Historio havas neeviteblajn leĝojn, kiujn ne povas aliigi la sensencaj fantaziaĵoj de iu Mussolini. Ekde nun, la Iberia Respubliko designiĝas ĉe la Eŭropa geografia karto. Adiaŭ al la romantika Hispanio k saluton al la novnaskiĝanta popolo!

ANDREO MORIZET

Franca senatano

la popola Esperantismo estu, sen makulo, la plej brila Esperantismo!

Ayuntamiento de Madrid

NIA MUNICIO

Valencia Esperantistaro . . .	104'65	ptoj.
F. F.—Mora . . .	25	
J. C.—Guadalajara . . .	12	
S. M.—Centra fronto . . .	10	
M. R.—Alcañiz . . .	25	
A. C.—Alcañiz . . .	29'55	
J. G.—Baza . . .	10	
E. V.—Benicalap . . .	10	
A. S.—Teruel . . .	20	
S. P.—Polan . . .	25	
F. G.—Sarrion . . .	25	
G. G.—Viver . . .	10	
L. P.—Caspe . . .	10	
R. A.—Pozoblanco . . .	25	
J. T.—Albacete . . .	19	
E. P.—Barcelono . . .	40	
H. M.—Albacete . . .	40	
M. G.—Farlete . . .	50	
J. R.—Sosa . . .	10	
R. T.—Skifiekos . . .	6	ffr.
N. T.—Malakoff . . .	20	
L. A.—Saint Raphael . . .	20	
V. M.—Olomouc . . .	20	
J. L.—New York . . .	28'57	
Lab. Esp. Grupo.—Nittedal . . .	42'85	
R. F.—Tours . . .	20	
E. T.—Mosjoen . . .	10	
J. P.—Rennes . . .	20	
M. E.—Mervaut p/ Poitiers . . .	10	
D. M.—Fez . . .	5	
F. E.—Fez . . .	5	
P. L.—Fez . . .	5	
M. M.—Fez . . .	5	
M. R.—Fez . . .	5	
P. G.—Evreux . . .	20	
Gr. Esp. Ouvrier.—Orleans . . .	10	
E. B.—Paris . . .	35	
F. K.—Zagreb . . .	17'50	
A. S.—Horní Litvinov . . .	25'25	
J. L.—Gr. Castelnau Magnoac . . .	50	
G. F.—Melbourne . . .	21'82	
K-dino. M.—Evreux . . .	10	
F. G.—Dammarie s/ Loing . . .	5	
H. D.—Halluin . . .	10	
H. L.—Dole . . .	15	
L. M.—Sallaumines . . .	15	
L. L.—Vauves . . .	5	
M. V.—Olomouc . . .	20	
J. O.—Lyon . . .	5	
H. Z. Ch.—Tientsin . . .	20	
H. L.—Marseille . . .	50	
P.—La Varenne St. Hilaire . . .	30	
L. P.—Malacky . . .	25'25	
Esp. Artistaro.—Paris . . .	50	
H. K.—Kusiko . . .	10'50	
I. A.—Tours . . .	20	
R. V.—Trainou . . .	7	
Solidarita.—Plzen . . .	20'20	
A. J.—Montdevergues p/ Montfaver . . .	10	
G. N.—Stockholm . . .	5	sv.kr.
Y. G.—Cöpi . . .	10	
W. C.—Rotterdam . . .	1	gd.
M. R.—Terorlando . . .	1	
A. S.—Amsterdam . . .	0'19	
D. J.—Rotterdam . . .	1	
T. G.—Wetszaan . . .	0'50	
K. S.—Wormer . . .	1	
H. K.—Imuiden . . .	1	
J. F.—N. Scharwonde . . .	2	
A. K.—Gouda . . .	1'75	
Kino. H.—Amsterdam . . .	0'50	
F. v. d. M.—Utrecht . . .	2	
A. v. d. G.—Amsterdam . . .	0'50	
C. D.—Amsterdam . . .	0'50	
G. C.—Leiden . . .	1'77	
J. v. d. R.—Alblasserdam . . .	0'25	
G. J. W.—Den Haag . . .	2	
B. H. L.—Rotterdam . . .	2'80	
L. C. V.—H. Leenwarden . . .	0'75	
F. L. E. Sekcio Amsterdam		
«La Generala» . . .	1'50	
L. H.—Ostende . . .	15	b.fr.
Esp. Grupo.—Bruxelles . . .	10	
Esp. Grupo.—Liege . . .	20	
R. D.—Ostende . . .	10	
K. O. L.—Hakans . . .	10	
A. Z.—Jumet . . .	50	
O. F.—Enival . . .	4'50	
C. P.—Bruselo . . .	5	

ABONMANIERO

Nia gazeto ne havas fiksan abonprezon. Ĝi eldoniĝas nur per laŭvola individua monhelpo de sia legantaro. Ni elektis tiun sistemon ĉar tiel, ĉiu kroma sumeto de tiuj, kiuj povas pagi iomete plie, ebligas la ricevon de agrabla legaĵo al multaj, kiuj pro senlaboreco, aŭ aliaj kaŭzoj, ne povas pagi sian propran kotizon. Tial, se la enhavo k celo de la revuo estas por vi aprobinda k plaĉa, pagu vian liberan abonon al iu ajn el niaj internaciaj agentejoj:

GENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono

GUSTAVE FARENC
55, Rue Brise-Pain
Poŝteĉkonto 15944 Orleans
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

BELGIO
K-DO M. DELFORGE
33, Rue de Heigne
Postĝiro 199106
CHARLEROI

ANGLIO
K-DO O. MELTON
23 Fowler Str. Nechells
BIRMINGHAM 7

NEDERLANDA ADRESO
nur por mono de holandanoj

PETRO van der PLANK
Van Speijksstraat, 48-1
poŝtĝiro 245542
AMSTERDAM W. Nederlando

SVEDIO
ARBETAR ESPERANTISTEN
Barnhusgatan 8 6. g. n. b.
Postĝiro n.º 53411
STOCKHOLM

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA

POPOLA FRONTO — Mar, 25, Valencia (Hispanio)

POPOLFRONTA LETERUJO

K. H.—Kopenhago.—Ni notis adresojn de novaj abonantoj, al kiuj ni sendos la gazeton. Ankaŭ ni dankas vian helpemon.

J. B.—Londono.—Viajn leterojn ni ricevis, kun «gufetoj». Ni notas vian deziron rilate al bulgara k-do k ĝin plenumos. Kara amiko, estu certa ke ni komencis la jaron de la venko. Viajn vortojn ni tutkore dankegas. Ĝis via nova!

J. L. C. B.—Worthing k J. M.—Mervaut.—Kore dankas ni vian sendon de petitaĵ n-roj kiuj mankis al nia kolekto pro elĉerpigo

I. G.—Cöpi.—Pere de k-do Delforge ni ricevis vian monsendon, kiun ni dankas; la kanto eble publikigota. Koran saluton!

G. T.—Raasiku.—Vian gratulon ni ricevis; la Teruela venko ne restos la lasta. Pri via dua monsendo ni nenion ŝcias. Viajn bondezirojn ni multe dankas.

J. L.—Pouy.—Ni ricevis la gazeton, kiu entenas tradukitan artikolon. Ni dankas la tradukon k ties sendon. Fratecan saluton!

Th. K.—Trëbic.—Responde al via p. k. ni sciigas, ke la monsendo estis jam kvitanĉata kiam ni ricevis vian klarigon. Tial ni kvitanĉis nur sub via nomo. Viajn bondezirojn ni dankas k reciprokas.

B. G.—Gablons.—Kun emocio ni legas la enhavon de via letero, kiel ankaŭ viajn bondezirojn.

A. M.—Londono.—K-do Bosch k Hernandez legis kun plezuro vian afablan leteron, pro kies sendo k enhavo ili tutkore vin dankegas.

B. H. L.—Rotterdam.—La enhavon de via letero ni zorge notis. Ni dankas viajn klopodojn k instigas vin al seĉesda daŭrigo.

J. P.—Plzen.—Via p. k. bone trafis nin. Ni agos laŭ viaj indikoj. Ade ni dankas pro via sindona helpo.

H. N.—Malmo.—Ni notis la enhavon de via ŝatata letero. La monsendon ni kvitanĉos post ricevo. Antaŭdankon!

E. L.—Aberdeen.—Vian p. k. ni ricevis k sendos la gazeton laŭ via deziro. Ne estas ŝksita abonprezo, sed vi povas sendi ĝin al nia peranto laŭpove aŭ laŭplaĉe. Dankon!

E. A.—Parnu.—Viajn amikajn vortojn ni multe ŝatas k instigas nin al persista laboro. Koran saluton!

W. M.—Oulu.—Ni zorgos pri viaj indikoj k sendos la mankantajn n-rojn. Viajn bondezirojn ni reciprokas.

M. D.—Paris.—Viajn vortojn k monsen-

don ni dankas. Kiel vi konstatis ni aperigas anoncetojn laŭ via deziro kesperas ke ĝi eŝkos

M. G.—Farlete.—Ni ricevis vian p. k. kun monsendo, kiun ni kvitanĉas aparte. Varmege ni dankas vin.

F. K.—Zagreb.—Ni bone ricevis vian leteron k tute komprenis vin. Ni sendos laŭ via deziro. Koran saluton!

J. M.—Troyes.—Ni via dankas pro via traduko k koncerna sendo de la gazeto. Ni esperas ke vi daŭrigos tiun eŝkan taskon.

R. V.—Trainou.—Kun malfruo ni respondas vian leteron. Certe nuntempaj faktoj pravas al vi nian ekzistantan unuecon. Vi ricevos la mankantajn n-rojn. Ni kordankas viajn amikajn dezirojn.

F. R.—Sur Tajo.—Viaj konsideroj estas atentindaj, sed rimarku ke nur temas pri laŭpova aŭ laŭvola abonprezo, tute ne deviga. Vi povas sendi ion ajn laŭ via plaĉo.

V. B.—Leningrado.—Ĉio bone trafis nin. Ni publikigas la deziran anonceton. Viajn amikajn frazojn ni sincere dankas.

P. L.—Parnu.—Laŭ via deziro ni sendis la leteron al k-do. Person k esperas ke la arango suĉesos. Koran saluton!

R. H. K.—Utrecht.—Ree ni publikigos anonceton k esperas ke ĝi nun eŝkos. Viaj pravaj k amara konsideroj estas pravaj, sed... kion fari? Laboradi k laboradi por venki ĉion! Fine ni sendube venkos la agemon de l' malamikoj k la neagemon de tiuj «amikoj». Koran saluton!

KORESPONDADO

Simpla trilinea anonceto 4 f. fr.

BULGARIO.—K-do St. Stanev, str. kn. Ĉerkaska 7 Sviŝtov, 24-jara studento dez. kor. k. ĉ. l. pri ĉ. t. Nepra respondo!

SOVETIO.—K-do Oktavo Saremo, strato Karlo Liebknekt 74, ĉambro 74, Leningrado 156, 14-jaraĝa dez. korespondi kun junuloj samaĝaj.

SOVETIO.—K-do Sidelnikov Aleksandr., ulica Marata N.º 115, Miĉurinsk, dez. interŝanĝi P. M., P. K. k ĵurnalojn.

HISPANIO.—K-do Angel Mateu, Parra 9, Bugarra (Valencio) deziras korespondadi kun sveda aŭ ĉina knab-in-o.

BULGARIO.—Bulgara k-do petas nin sciigi al A. Pencik, Kharkov 17, ul. Koflova 66/3, USSR kaj A. van Kampen, Amsterdam, Nederlando, sbrui al Ji ĉar li ne ŝcias iliajn adresojn de post jaroj. Adreso de k-do Hristovski estas la malnova.

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33, Valencia